

Heinrich Heine,
En dolĉega Maj’

*tradukita de Friedrich
Pillath*

Printempe en dolĉega
Maj’,
Dum la burĝonoj krevis,
El mia koro ĝerme
Amsento sin eklevis.

Printempe en dolĉega
Maj’,
Dum birda kanto sonis,
De l’ kora mi sopiro
Konfeson al ŝi donis.

*Traduko de la Germana
poemo “Im Mai” de HEIN-
RICH HEINE (*1797-12-
13 – †1856-02-17) en Espe-
ranton de FRIEDRICH PIL-
LATH (†1932-04.03).*

*Arg-203-434 (2015-04-09
15:05:52)*

*Tiu ĉi traduko aperis en
Elektitaj Poemoj, Berlin:
Esperanto-Verlag Fried-
rich Ellersiek (2a eldono),
1920, p. 13. La origina
germana-lingva versio
troviĝas en la „Libro de
la kantoj“, sekcio „Lirika
intermezo“ (1822 - 1823),
n-ro I. Pri F. Pillath vidu
ankaŭ la vikipedian retejon
[http://eo.wikipedia.
org/wiki/Friedrich_
Pillath](http://eo.wikipedia.org/wiki/Friedrich_Pillath).*

Heinrich Heine,
En Majo

*tradukita de Man-
fredo Ratislavo*

En Majo, kiam ĉiuj
Burĝonoj malfer-
miĝis,
La amo kiel floro
En mia kor’ estiĝis.

En Majo, kiam ĉiuj
Birdetoj sin aŭdigis,
Al ŝi deziron mian
Sopiran mi sciigis.

*Traduko de la Ger-
mana poemo “Im
Mai” de HEINRICH
HEINE (*1797-12-
13 – †1856-02-17) en
Esperanton de MAN-
FREDO RATISLAVO
(Manfred Retzlaff,
Stettiner Str. 16,
D-59302 Oelde, Ger-
manio, *1938-11-04)
en 1982-11-14.*

*MR-002-4 / Arg-
203-403 (2004-04-05
20:37:00)*

*La poemo troviĝas en
la „Libro de la kan-
toj“, sekcio „Lirika
intermezo“ (1822 -
1823), n-ro I.*

Heinrich Heine,
En la mirida
bela Maj’

*tradukita de Kálmán
Kalocsay*

En la mirinda bela
Maj’,
dum sin burĝonoj fen-
dis,
en mia kor’ la amon
mi disvolviĝi sentis.

En la mirinda bela
Maj’,
dum birda tril’ ne
ĉesis,
al ŝi sopiron mian
konfide mi konfessis.

*Traduko de la Germa-
na poemo “Im Mai”
de HEINRICH HEINE
(*1797-12-13 – †1856-
02-17) en Esperanton
de KÁLMÁN KALOCSAY
(Kalmano Kaloĉajo,
1911 – †1976).

*Arg-203-1082 (2010-05-
26 12:08:05)*

Heinrich Heine,
En admirinde
bela maj’

*tradukita de Hans-
Georg Kaiser*

En admirinde bela
maj’,
dum jam burĝonoj kre-
vis,
jen ankaŭ miakore
la amo sin eklevis.

En admirinde bela
maj’,
dum birdotril’ senbri-
dis,
jen mi al ŝi sopirojn,
dezirojn, ekkonfidis.

*Traduko de la Germa-
na poemo “Im Mai”
de HEINRICH HEINE
(*1797-12-13 – †1856-
02-17) en Esperanton de
HANS-GEORG KAISER
(Cezar, *1954-05-21).*

*Arg-203-431 (2004-03-24
07:33:04)*

*La poemo troviĝas en
la „Libro de la kantoj“,
sekcio „Lirika intermezo“
(1822 - 1823), n-ro I.
La traduko estas korekti-
ta laŭ la lasta ŝanĝo, ki-
un faris s-ro Hans-Georg
Kaiser en 2004-03-21.*